

Ne estu koko, venu al KKPS!

Proksimiĝas rapide la aŭtuno, kaj kelkaj el vi ja dezirus transsalti la tutan someron. Ĉar tiam okazos Klaĉ-Kunveno Post-Somera (jam la sesa), de la 27-a ĝis la 29-a de oktobro 2017, en Lunteren, Nederlando.

La pintoj de la programo estos la **originala kvaropo de Kajto**, kaj kostumita ŝminkita halovena balo kun **unu aldona horo!**


Lunteren estas la urbo en Nederlando kun plej multaj kokoj. Krome ĝi havas grandan junulargastejon, kun luksaj kaj modaj amasloĝejoj. La loko estas kompreneble facile atingebla per publika transporto....



Kotiztabelo:

	Benelukso	Okc. Eŭropo	Resto
30+	€65	€55	€50
20-29	€55	€50	€45
4-19	€45	€40	€35
3-		€10	

Rabato de €10 por membroj de TEJO aŭ NEJ. Post julio €5 pli. Antaŭpaĝo €15.



Pos-Amiko

Somero 2017, Numero 21

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Esperanta Civito kaj SAT kuniĝas!
1. Post unua afrika IJK nun ankaŭ unua afrika estraro
2. Translimaj renkontiĝoj
2. FESTO tamen okazos
2. TEJO-volontulo perdita en arĥiva lavango
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Esperanta Civito kaj SAT kuniĝas!

Ankoraŭ ne estas oficiala anonco, sed laŭ fideblaj fontoj baldaŭ estos anoncita fuzio inter la Sennacia Asocio Tutmonda kaj la Esperanta Civito. La du asocioj vidas multajn similaĵojn kaj esperas kune pli bone atingi siajn komunajn celojn.

Proparolanto Giorgio S. rimarkas: “Ambaŭ la asocioj malŝatas neŭtralismon, ambaŭ volas ŝanĝi la nunan kvanton da ŝtatoj en la mondo, kaj ambaŭ havas membrojn.” Ankoraŭ ne estas konate, kiu estos la laborlingvo de la komuna organizo, sed ĉar la sidejoj troviĝas ambaŭ en francparolantaj urboj, plej verŝajne estos daŭre uzi la francan.

Post unua afrika IJK nun ankaŭ unua afrika estraro

Post longa laborado nun venis la decida horo, ke la TEJO-Estrararo venkos per atingi gravan strategian celon: la unua IJK en Afriko. Sufiĉe da bataloj kaj klopodoj necesis, sed nun la estraranoj povas trankviliĝi kaj salti for, ĉar ankaŭ okazos elekto de nova estraro.

Jam teni la estraranojn ne facilas, lacaj de la laboro. Pro tio la Elekta Komisiono anstataŭe trovis sufiĉajn kandidatojn por la unua TEJO-Estrararo tute el enloĝantoj de Afriko. Kandidato por prezidanteco, H. Miacor, diras: “Ne fartu maltrankvile, TEJO-Estraranoj daŭre flugos de loko al loko.”

Nova modo: translimaj renkontiĝoj

Multaj Landaj Sekcioj de TEJO havas sian propran renkontiĝon, al kiu ili invitas eksterlandanojn. Tio estas bona maniero por montri sian landon al aliaj. Tamen kelkfoje okazis, ke renkontiĝo de unu landa sekcio okazis en alia lando. Ekzemploj estas FESTO 2009 en Germanujo, JES 2015/6 en Hungarujo, kaj diversaj IJK-oj ekster Eŭropo.

Ekonomiaj analizistoj de la Pos-Amiko prognozas, ke tiu ĉi modo revenos. Plej verŝajnaj kandidatoj por eksterlande organizita renkontiĝo estas Krimeo por Rusia Esperanto-Kongreso, Slovenujo por IJF, kaj Britujo por EEU-kongreso. Laŭ kelkaj homoj ankaŭ KKPS jam unufoje okazis ekster Nederlando, se oni ne konsideras Heerlen parto de Nederlando.

La avantaĝoj estas multaj: pli bonaj rilatoj kun aliaj landaj sekcioj, konatiĝo kun najbara lando, kaj lasi eksterlandanojn fari vian surlokan laboron. La landa sekcioj, kiuj povas plej multe profiti de tio, estas REJM kaj ĈJEA, ĉar tiuj landoj havas plej multajn najbarojn.

FESTO tamen okazos, sed vi ne estas invitita

Antaŭ kelkaj monatoj atingis nin la ploriga novaĵo, ke en 2017 ne okazos FESTO, la somera internacia renkontiĝo de JEFO. Tiam la redakcio de la Pos-Amiko supozis, ke tio estas pro manko de sufiĉaj aliĝoj por la okazaĵo. Poste aperis tamen aliaj informeroj, kaj nun Pos-Amiko povas malkovri al vi la veron:

FESTO fakte okazos, sed sen gastoj. La organiza teamo legante la programon konsciis, ke ĝi estos tro mojosa por dividi kun aliaj homoj. Eĉ la artistoj pagas por ĉeesti la muzikfestivalon, do ne estas risko je monperdo.

TEJO-volontulo perdita en arĥiva lavango

Pasintsemajne en la Centra Oficejo de UEA okazis kolapso de alta stako de arĥivaj skatoloj en la etaĝo, kie laboras la volontuloj de TEJO. Unu junulo pereis, sed ŝi ankoraŭ ne lernis Esperanton.

NEJ-Novaĵoj!



Membroj de NEJ antaŭ florplena kampo

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Vi malkovros, ke Esperanto pli utilas ol elefanto.

Taŭro: Ekhavu afrikan naciecon por la estraro!

Ĝemeloj: Vi lernos instrui per sekta metodo.

Kankro: Atentu pri tro altaj arĥivoŝrankoj.

Leono: Vi iĝos rokstelulo por provi iri al FESTO.

Virgulino: Post estrarelekto vi ne plu estos.

Pesilo: Via Pos-Amiko ekbrulas en varmega suno kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Plej bonas enskribi tuj ĉiujn viajn familianojn por KKPS, inkluzive de nenaskitaj.

Kévin M.: Dum FESTO vi lernos kiel sole danci la Bambon.

Sagitario: Vi okupos la Centran Oficejon.

Kaprikorno: Neniu pli bele ronkos ol vi ĉi-somere.

Akvisto: Vi deklamos tiun ĉi Pos-Amikon en plena trajnstacio.

Fiŝoj: Tute ne gravas.

Florotago, fototago kaj Hago-tago

Post la lasta Pos-Amiko okazis jam tri NEJ-tagoj! La 23-an de aprilo ni biciklis inter la koloregaj floroj sude de Haarlem (vidu la belan foton).

Je la 14-a de majo ni iris al Maastricht.

Originale planita kun la skoltoj, sed finfine venis nur kvar homoj. Tamen la tago estis sufiĉe sukcesa kun tre amuza fotokonkurso. Kiel foti 'elektron' aŭ 'kuraĝon'?

Kaj je la 10-a de junio NEJ subtenis la KER-ekzamenantojn per apuda pikniko en parko en Hago. Tute hazarde tri orkestroj venis al nia herbejo por fari publikajn koncertojn dum ni manĝis niajn mem bakitajn kukojn. Kaj gratulojn al ĉiuj, kiuj sukcesis sian ekzamenon tiutage!